# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' --- Sceno sep

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la sepan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

Unua parto

| | |
|---|---|
| 1. komparo -------------------- | A. tenilo por letero |
| 2. proporco -------------------- | B. propono |
| 3. forumo -------------------- | C. penti, malĝoji |
| 4. kotizi -------------------- | Ĉ. pagi sumon por esti membro en asocio |
| 5. bedaŭri -------------------- | D. matematika rilato inter parto kaj tuto |
| 6. neĝo -------------------- | E. forpreni, maladicii |
| 7. oferto -------------------- | F. forlasi, ellasi, ne konsideri |
| 8. subtrahi -------------------- | G. estimo |
| 9. respekto -------------------- | Ĝ. diskutejo |
| 10. ekskludi -------------------- | H. boligita formo de akvo |
| | Ĥ. apudigo de du mezuroj |
| | I. frostigita formo de akvo |

Dua parto

| | |
|---|---|
| 1. apoganto -------------------- | A. akuzo de alia persono |
| 2. denunco -------------------- | B. ĉesi, fini |
| 3. lojala -------------------- | C. diskut-listo |
| 4. fuŝa -------------------- | Ĉ. erara, stulta |
| 5. prepari -------------------- | D. fariĝi parolanto de Ido |
| 6. lanĉi -------------------- | E. fermebla meblo |
| 7. sekreto -------------------- | F. fidela |
| 8. tagordo -------------------- | G. homo kiu subtenas ion |
| 9. konfeso -------------------- | Ĝ. iniciati, starti |
| 10. ŝranko -------------------- | H. kaŝaĵo |
| | Ĥ. memkulpigo |
| | I. pretigi |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. La manĝado de sandviĉoj, laŭ Mart, montras __________**
a) grandan malsaton.
b) troan okupitecon pro kunsido-svarmon.
c) malrespekton por la seriozeco de la laboro.
ĉ) intencan klopodon gluigi la kalkulilon de Krista.

**2. Kiujn perfidulojn Bur ne specife mencias?**
a) Sekretajn raŭmistojn.
b) Kaŝajn apogantojn de la angla.
c) Enŝrankajn idistojn.
ĉ) Allasintojn de defetismo.

**3. Kion signifas la mallongigo "KSM"?**
a) Kongreso de San Marino.
b) Koresponda Servo Mondskala.
c) Komisiono pri Statistikaj Mistaksoj.
ĉ) Komitato por Servado al la Membraro.

**4. Kion signifas la mallongigo "ILEI"?**
a) Internacia Laborgrupo pri Ekstera Informado.
b) Interna Leĝaro de Ekzamenaj Instancoj.
c) Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
ĉ) Instituto por la Libera Edukado de Indiĝenoj.

**5. Kion signifas la mallongigo "BEMI"?**
a) Brita Entrepeno pri Manfaritaj Instrumentoj.
b) Brigado de Esperantistaj Matematiko-Instruistoj.
c) Bando de Esperantistaj Muzik-Interpretistoj.
ĉ) Biciklista Esperantista Movado Internacia.

**6. IAdEM estas __________.**
a) faka asocio por muzikistoj
b) faka asocio por matematikistoj
c) landa asocio por Madagaskaro
ĉ) ekonomia asocio por milionuloj

**7. Kiu vorto ne estas sinonimo de "strebo"?**
a) lukto
b) provo
c) koboldo
ĉ) klopodo

**8. La celo de la nova kalkulo pri la nombro de esperantistoj estas _____**
a) atingi pli realisman nombron.
b) atingi kiel eble plej altan nombron.
c) atingi kiel eble plej malaltan nombron.
ĉ) devigi al Krista trovi sian kalkulilon.

**9. Kiu estas malvalida kialo por la malsukceso varbi en Skotlando?**
a) Neĝis dum la disdonado.
b) Senpaga aliĝo al Universala Kongreso ne alogis la ricevantojn.
c) La menciita kongreso kun senpaga aliĝo devis okazi en Detroit.
ĉ) Ili disdonis la varbilojn dum nur 25 minutoj, kaj tio ne sufiĉis.

**10. La esperantistoj lanĉas esploron pri la _________ de iliaj ŝlosilaj agantoj.**
a) fidindeco
b) fikonduto
c) financoj
ĉ) finantoj

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

S E B A Z O N    _ ☐ ☐ _ _ ☐ _

P R I N C O P O R O    _ _ _ _ _ ☐ ☐ ☐ _ _

R U S T A R E S T    ☐ ☐ _ _ _ _ _ _ ☐

D I K U R A N G O    ☐ _ _ ☐ _ _ _ ☐ _

P U N T D U K O    ☐ _ _ _ _ ☐ _ _

L U L I K L A K E    ☐ ☐ ☐ _ _ _ _ _ _

Kio fine okazas ĉe la esperantistoj?

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _    _ _ _ _ _ _ _.

## 4) DEMANDOJ

1. Ĉu estas facile aŭ malfacile taksi la nombron da esperantistoj sur Venuso? Kiuj estas la eblecoj?
2. Kiu estas la dua tagorda punkto?
3. Kiumaniere la tasko diferencas de tiu en sceno unu?
4. Ĉu la konduto de Aldo ŝanĝiĝis inter la du scenoj?
5. De kie venas raporto pri varbado? Kia ĝi estas?
6. Kial Krista mallonge forlasas la kunsidon?
7. Kio estis la fina sumo de ilia kalkulo? Kiel ili atingis tion?
8. Kial ili ĝojas pri tiu tre modesta rezulto?
9. Kiun konkludon ili poste tiras el tiu sumo?
10. Kion ili komencas fari sekve de tiu konkludo?

## 5) PARIGU

*Trovu la antonimojn (vortojn kun kontraŭaj signifoj):*

| | |
|---|---|
| 1. ekskludi | A. foriri |
| 2. adicii | B. harmonio |
| 3. aktiva | C. inkluzivi |
| 4. alveni | Ĉ. multipliki |
| 5. akcepti | D. okazanta |
| 6. kverelado | E. pasinta |
| 7. virtuala | F. pasiva |
| 8. oblikva | G. perdi |
| 9. venonta | Ĝ. reala |
| 10. gajni | H. rekta |
| | Ĥ rifuzi |
| | I. subtrahi |

*Kiom el tiuj vortoj reale akceptus la prefikson "mal-" por esprimi la antonimon?*

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**